



## Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI, 5-a de Novembro 2018

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Ŝlomo Ŝaĥar, Mikaelo Lineckij, Dror Gaon, Asaf Ĥefec, Gabi Zeevi.

*Protokolo de la antaŭa kunsido (8-a de Oktobro 2018) – publikigita en la retejo.*  
<http://esperanto.org.il/dosieroj/ELIEP201809.pdf> , sendita aldone kun la tagordo.

### **1. Raportoj**

- a) Dratverejo: pro la anonco en Yad-2 (dank al Gabi) ĝi estis luita (dank al Amos) ekde mezo de Oktobro. Plibonigita por 5500 NIS, aspektas tre bele. Jehoŝua subskribis nome de ELI kun la projekta advokato Omid. Realiĝos la plano “evakuo-rekonstruo”, ene de du jaroj, sed la luantoj povas resti ĉ. la venontajn du jarojn senĝene.
- b) Amri kaj Tali prelegis pli ol 2 horojn en kunveno de la Israela Tradukista Asocio la 28-an de oktobro. Raporto pri ĝi aperos en la decembra Revuo de Esperanto.
- c) Amri finis E-kurson "Nicocot" en mezlernejo de Modiin kun 17 lernantoj.

### **2. E-kursoj en Tel-Avivo** (Amri kaj aliaj)

- a) Daŭriga kurso - Doron komencos la 26an novembro.
- b) Ĉu Mikaelo ofertu senpagajn lecionojn la 12-an kaj 19-an de novembro? *Li konsentas!* Ili estos distraj lecionoj, ekde 19:45 ĝis 21:00, kaj malfermitaj ankaŭ al la klubanoj.
- c) Kiom longe daŭru la kurso? Ĉu 8 lecionoj? – *Decido: 8 lecionoj. Doron ricevos rekompencon, poste li faros 3-semajnan paŭzon antaŭ la daŭriga kurso.*
- ĉ) Komencanta kurso: Doron pretas instrui post la fino de la daŭriga kurso, post la paŭzo.
  - ĉ-1) Reklamado? – En Facebook, kontraŭ kelkcent sikloj, kaj en la kultura aldono de Ha-Aretz, kontraŭ kelkmil sikloj – ĉar tio estis la plej efika propagandilo.
  - ĉ-2) Kotizo? - kiel estinte, 400 sikloj por la tuta kurso.
  - ĉ-3) Daŭro? – devos komenciĝi la 11-an de februaro, kaj finiĝos je la komenco de julio.

### **3. Zamenhofa Vespero kaj Landa Kunveno** - la 11-an de decembro

- a) La oficiala parto (Ĝenerala Kunsido) estos pli longa ol kutime, por trakti la du temojn postulataj de la Registristo: aĉeto de oficejo, kaj repago de elspezoj.
  - Ni devas aprobi la decidon pagi vojaĝelspezojn (prezenti precizan vortumon).
  - Devas prezenti la intencon de la Asocio aĉeti oficejon, kaj voĉdonigi la precizan celon. Pro tiu diskuto devas atentigi Matilda, ke la arta parto povas esti pli mallonga!
- b) La prezidanto de la kunveno estu anticipa elektita kaj informita pri la tagordo kaj siaj taskoj.
- c) Antaŭ la balotoj, kiel ĉiam, oni demandu, ĉu estas aldonaj kandidatoj, kaj ĉu oni deziras individuan (ne-blokan) voĉdonon.
- ĉ) Ŝlomo prezentu la financajn raportojn. Li havas 6 punktojn, kiujn oni devos diskuti. Amri dissendos ilin al ELI-listo.
- d) Ĉiuj konsideru helpi al Miĥal en la preparado de la regalo. Ĉu ŝi akceptos?

2/...



#### 4. Oficejo (Ŝlomo, Amri)

- a) Kian oficejon ni volas? – Jehoŝua: nur magazenon por niaj libroj. Aliaj: ne, ni bezonas kunvenejon (kunsidoj, klubo, kurso)! Kiom granda? Kie? Por kia sumo? Ĉu kaj kiel luigi?
- b) Financado: hipoteke? prunto?
- c. Nur en Tel-Avivo, aŭ eblas ankaŭ iom for kiel Bnei Brak?
- ĉ. Uzi kiel klubo (30-40 m<sup>2</sup>) aŭ kiel investo?

Diskuto: Ŝlomo kaj Asaf subtenas la oficejon en Bnej Brak, por kiu ni ne bezonos hipotekon. Pluraj aliaj kontraŭas, ĉar ĝi ne utilos kiel klubejo. Decidoj: *Ni celas aĉeti ĉ. 30-40 m<sup>2</sup>, por ĝis 700 mil sikloj (nete), kiu servos nin por ĉiuj celoj. Nur en Tel-Avivo. (Devas rezigni al Bnei Brak!). Se eblos duonigi, ni luigos parton. Ŝlomo devos paroli kun Mizraĥi Tfaĥot, ke ili kiel eble garantiu la hipotekon, se ni komencos la aĉet-procezon. La Estraro de Eli kaj ĝiaj gvidantoj devas havi pli efikan rajtigon por eniri tian proceson, aliel ĉiu bona okazo, kiun ni havos, malaperos tro rapide (tio jam okazis!).*

#### 5. Financoj (Ŝlomo)

- a) Respondo de la registristo: Ŝlomo respondis, la Registristo akceptis!
- b) Elpreno de nia kapitalo el Menora kaj de UEA: En Menora ni ricevas tre malaltan interezon. Ankaŭ ilia sinteno al ni ne estis kontentiga. Ŝlomo elprenos la monon, kaj investos alie, post konsulto kun Eran. En UEA ni havas ĉ. 10 mil eŭrojn, senprofite. Ni elprenos ĝin, lasante mil eŭrojn en la konto. *Voĉdono por ambaŭ: unuanime akceptitaj!*
- c) Financa raporto: Ŝlomo dissendis – ni revenos al ĝi dum la decembra kunveno.

#### 6. Israela E-isto (Mikaelo, Amri)

- a) Mikaelo jam enpaĝigis preskaŭ la tutan n-ro 166 (vintro 2018)
- b) Amri sendis Word-version al Gabi kaj Eldad, la provlegantoj. Celdato por la presejo: 1/12. La presejo bezonas PDF-dosieron, kiu povas esti produktita rekte el Publisher, la programo, kiun uzas Mikaelo, do li ne bezonas iri tra Word, kiun li ne bone konas.
- c) Post presado, la disdonado estos dum la Zamenhofa Vespero, kaj poste – dissendado.

#### 7. IK-20 Eilat+Akaba (Amri)

- a) Amri verkis anoncon, kiu aperos en la decembra n-ro de Esperanto.
- b) Nun estas ege malaltaj rektaj flugoj de Eŭropo al Eilat: 65-100 eŭroj!
- c) Amri rezervis en "Club-Inn" Eilat por tri noktoj. prezo: 750 NIS por 3 noktoj.
- ĉ) Amri dissendis la novan anoncon kun la novaj informoj (3 noktoj kaj malaltkostaj flugoj) al multaj informejoj, redaktoroj, potencialaj partoprenantoj.
- d) Artistoj: Kajto povos nur en Eilat. Jomo akceptis koncerti en Akaba+Eilat.

#### 8. UEA kotizŝanĝo (Jehoŝua) - Jehoŝua vortumos protest-leteron, Amri subskribos.

**La venonta kunsido:** 3-a de Decembro 2018, 19:30.

Protokolis: Gabi Zeevi